

La Riverego kebekia esperantista bulteno

Oktobero 2005

Esperanto-Societo Kebekia

Jaro 20, No 81

Plia jaro en la movado!

Normand Fleury, prez.

La lasta movada jaro en Kebekio estis pli bona ol la antaŭaj. Ni eldonis belan dukoloran informilon, grafike nia plej bela ĝis nun, danke al Jérôme Frédéric Bouchard.

Aperis nova kebekia verko en Esperanto kaj tio estas tamen raraĵo, nome *Nanatisis*, verkita de Robert Dutil kaj tradukita de Edmond Brent. Ni eldonis 300 ekzemplerojn kaj jam 100 estas for. Do rapide mendu vian kopion kontraŭ la favora prezo 10\$ antaŭ la fino de 2005 se vi estas membro de ESK. (Kutima prezo poste: 15\$.)

Kursoj okazis en Kolegio Maisonneuve fare de Normand Legault kaj ĉe Montreala Universitato zorge de Boris-Antoine Legault.

Nia retejo transiris (sen ke vi rimarkis tion) de Sympatico al Communucations accessibles Montréal (cam.org) kaj tio postulis tempon al Martin Benoit.

La klubaj kunvenoj okazadis ne nur en la Montreala Esperanto-Domo (MEDO) sed ankaŭ en la restauracio Commensal, strato Saint-Denis. Fakte la kunvenoj multe pli viglis kaj modele François Lorrain partoprenis ilin ĉiujn; krome li prelegis publike pri Esperanto en la Kolegioj Brébeuf kaj Maisonneuve.

Nun Sylvain Auclair okupiĝas pri la RiveReto, nia reta bulteneto kiu informas vin pri kunvenoj. Li ankaŭ modele gvidas la financon de nia societo.

Mi do plene kontentas pri la laboro de la estraro kaj la aktivado de pluraj membroj. Vi ja vidas ke ju pli da homoj aktivis des pli da rezultoj videblas. Sed mi finu per la plej bela novaĵo de la jaro, nome la starigo de E-klubo en diversaj universitatoj en Montrealo. Baldaŭ du kaj eventuale tri. Tio estas bonega progreso kaj mi sincere dankas la gejunulojn kiuj aktivis al tiu sukceso.

La mondo bezonas Esperanton, necesas informi kaj informadi pri tio.

Club d'espéranto à l'UQÀM!

Boris-Antoine Legault

Après la création de clubs étudiants d'espéranto à l'Université de Montréal au début de l'année 2005, et à l'Université McGill il y a seulement quelques mois, quelques étudiant-e-s de l'UQÀM souhaitent maintenant former une association d'espéranto dans cette université.

Le responsable du projet est Sylvain Galarneau, qu'on peut rejoindre à l'adresse suivante: uqam@esperanto.qc.ca. Le mouvement étudiant pour l'espéranto s'active, et bientôt à Montréal l'Université Concordia sera la seule à ne pas avoir de club officiel d'espéranto. Après les carrés rouges portés fièrement par les étudiant-e-s québécois-es l'hiver dernier, bientôt les étoiles vertes ☺?

Esperanta klubo en UQÀM!

Boris -Antoine Legault

universitato.

Post kreo de studentaj kluboj ĉe Universitato de Montrealo komence de jaro 2005, kaj ĉe Universitato McGill antaŭ nur kelkaj monatoj, UQÀM-aj studentoj nun planas kreon de studenta Esperanta asocio ĉe tiu

La nuna respondeculo estas Sylvain Galarneau, kiun oni povas kontakti rete ĉe: uqam@esperanto.qc.ca. La studenta Esperanta movado ŝajnas esti pli kaj pli aktiva, kaj post iom da tempo en Montrealo nur

Universitato Concordia malhavas Esperantan klubon!

Post fiera montrado de ruĝaj kvadratoj fare de Kebekiaj studentoj pasintan vintron, ĉu baldaŭa la verda stelo iĝos amasa studenta simbolo ☺?

Club d'espéranto de l'Université de Montréal:

udem@esperanto.qc.ca

McGill Esperanto Club:

mcgill@esperanto.qc.ca



Dum la budo ĉe la Montreala Universitato...

Maldekstre : Jérôme Frédéric Bouchard; dekstre : Luis Castro



Société québécoise d'espéranto
Esperanto-Societo Kebekia

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Rédaction : Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Administrateurs de la SQE : Normand Fleury (président), Boris-Antoine Legault (Vice-Président), Vincent Riendeau, Sylvain Auclair (trésorier) et Martin Benoit (conseiller).

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junio, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo : kebk-d. Redaktado: Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Estraranoj de ESK : Normand Fleury (prezidanto), Martin Benoit (vicprezidanto), Jérôme Frédéric Bouchard (sekrétaire), Sylvain Auclair (kasisto) kaj Boris-Antoine Legault (konsilanto).

Échéance pour le prochain numéro / *Limdato por la venonta eldono* : 2005.11.20

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 • informo@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

Impresoj...

Zdravka Metz

Impresoj pri la libro la «Zamenhofa Strato», aŭtoro : Roman Dobrzynski

En Varsovio, ja, ekzistas strato kiu havas tian nomon. Estas la strato kie loĝis doktoro Zamenhof ĉe numero 9. En la sama strato vivis poste lia nepo Ludvig Kristofor Zaleski Zamenhof.

Roman Dobrzynski, la aŭtoro de ĉi libro havis genian ideon. Li notis interparoladojn kun la nepo pri plej diversaj temoj kiuj rilatas tamen familion Zamenhof : pri familia nomo, pri la tempo kiam vivis doktoro Zamenhof, pri liaj pensoj, ideoj, okupoj, sentoj (eĉ, ĉu li sentis sin kiel Polon, Ruso, Litoviano aŭ Judo? Kvazaŭ la nepo metus lumon sur ĝis

nun nekonataj detaloj de la vivo de doktoro Zamenhof. Same detale li priskribas tempon en la getto en Varsovio kaj malaperon de ĉiuj infanoj de Ludoviko. Tre emocie vi travivas momentojn, la faktojn kiuj savis la nepon kaj kial lia patrino donis al li nomon Zaleski...

S-ro Zaleski Zamenhof estis konstruinĝeniero kaj li estas la homo de larĝa kultura horizonto kiu bonege konas Eŭropon kiel la mondon. Aŭskultante lin pri klarigoj kiuj donas por ĉiu starigita demando, vi informiĝas

pri konstruado de pontoj, pri historio de Pollando, pri politikaj situacioj en Francio dum la unua E-kongreso; kial Francoj ne volis je ke ĵurnalistoj eksci ke Zamenhof estis Judo; aŭ kial Zamenhof ne volis prezenti sian projekton pri homaranismo dum kongreso en Svislando, same vi informiĝas pri nuna eŭropa komonumo, la moderna babilono kaj problemoj de tradukado kaj malŝparo de mono kaj spaco, por ne paroli tro pri ekologia problemo – la papero. Kompreneble la diskuto temis pri Esperanto kaj la movado kaj esperantisoj...

Same detale li priskribas tempon en la getto en Varsovio kaj malaperon de ĉiuj infanoj de Ludoviko.

Estas granda plezuro legi Zamenhofan straton, estas ĝojo aŭskulti intelektajn konversaciojn.

La libro estas sama tempo granda kontribuo al Esperanta kulturo.

Ĉi somere mi partoprenis internacian renkontiĝon de Esperantaj skribistoj en Kroatio kie mi ĉeestis promocion de Zamenhofa strato en la kroata. Tie mi renkontis polan ĵurnaliston, la aŭtoron Dobrzynski. La nepon Zaleski Zamenhof mi vidis dum du UK-oj.

Do, legante la libron, mi kvazaŭ sidas apud du Poloj kiuj mense promeniĝas min tra la tempo kaj spaco.

Ĉu vi ricevas la RiveReton?

Sylvain Auclair

Po unu aŭ du fojojn en monato, la Esperanto-Societo Kebekia sendas retroŝtan informbultenon al siaj pagintaj kaj nepagintaj membroj, kiuj deziras tion kaj kies adreson ni konas. Tio estas la plej bona maniero ekscii pri diversaj anoncoj kaj pri baldaŭaj renkontiĝoj, eĉ neplanitaj. Se vi ne ricevas ilin, sendu vian nomon kaj retadreson al silvano@esperanto.qc.ca.

Dankon.

Recevez-vous la RiveReto?

Sylvain Auclair

Une ou deux fois par mois, la Société québécoise d'espéranto fait parvenir un bulletin courriel à ceux de ses membres payants et passifs qui le désirent et dont on connaît l'adresse courriel. Il s'agit de la meilleure façon pour nous de faire parvenir des petites nouvelles et de rappeler la date des événements que nous organisons, même de manière non planifiée. Si vous ne recevez pas ce bulletin, faites-nous parvenir vos nom et courriel à silvano@esperanto.qc.ca.

Merci.

Kelkaj notoj pri niaj financoj

Sylvain Auclair

La financa jaro de la Esperanto-Societo Kebekia, kiu finiĝis la 31-an de majo, montris grandegan profiton, je preskaŭ 2 500 \$. Jes ja! Tio tamen estas eksterordinara afero, kiun ni ŝuldas la unufoja donaco je 2 500 \$.

Tiu donaco ebligis nin eldoni la libron Nanatasis, fabelo verkita de S-ro Robert Dutil. Tio kostis preskaŭ 500 \$nj, interalie pro donacitaj 33 ekzempleroj: al la aŭtoro, al la tradukintoj, al diversaj bibliotekoj kaj E-libroservoj. Je la 31-a de majo, restis por vendi 229 ekzemplerojn el 300, kun valoro po dek dolaroj. Tiuj 2 290 \$ konsistigas preskaŭ la duonon de la societa kapitalo, kiu altas je 5 695 \$.

Aliaj elstara kosto estas nia grupa abono al Le Monde

Et ça fonctionne vraiment l'espéranto?

Vincent Riendeau

Eh oui, vous êtes naturellement, comme moi, des habitués par rapport à cette interrogation. Peut-être développez-vous encore votre réponse, peut-être est-ce déjà fait... Mais il est certain que vous répondez toujours oui. Enfin, le plus beau c'est de pouvoir acquiescer d'un « oui » qui a vu l'Espérantie...

Et c'est cet été que j'ai vraiment pu y arriver. Au beau milieu d'un

de l'Espéranto, pli ol 600 \$, sumo tamen plene pagita per la pasintjare ricevitaĵoj; la ĵusjaraj kotizoj pli altas, al 913 \$.

Niaj bazaj kotizoj preskaŭ duobligis, de 570 \$ al 1 084 \$, sed tio ĉefe ŝuldiĝas al la enkonduko de dujara kotizo por ĉiuj (tio tre simpligas nian administradon). Kvankam pluraj kotizoj estas renovigotaj dum la jaro 2005-06, ni devas atendi grandan malkreskon en tiu kampo. Ni tamen notu, ke tiuj 1 000 \$ preskaŭ kovras niajn bazajn kostojn: 200 \$ por La Riverego, elstare 514 \$ por informado (presado de nova flugfolio), 167 \$ por la TTT-ligo (sed tio kovras la sekvantajn kvar jarojn) kaj 400 \$ por oficejo kaj renkontiĝoj.

Konklude, la financa situacio de ESK ja estas modesta sed sana. Laplena financa raporto troveblas ĉe www.esperanto.qc.ca.

océan gargantuesque de bureaucratie lourde catégorie anarchique et qualité A+, les espérantistes russes m'attendaient le thé à la main et le sourire aux lèvres.

Lorsque l'on arrive à Moscou pour la première fois et que l'on s'attend à retrouver des ruines communistes ou simplement une atmosphère surréaliste, on est rapidement déçu par les tempêtes homériques d'appareils photos qui sévissent sur la Place Rouge ou à l'entrée du Kremlin. Je dis bien à l'entrée, le Kremlin

lui-même étant gardé davantage par une muraille touristique que par une police, la sympathiquement corrompue « militsia » (Милиця). C'est peine gaspillée; ça ne cesse jamais.

Enfin oui! Mais pas pour tout le monde. Au premier contact espérantiste on sent la chaleur écrasante boulgakovienne se transformer en brise innocente et une certaine odeur culinaire de soupe borsch, de blinis au caviar ou simplement de pelminis à la crème fraîche envahit notre nez déjà pénétré par les douces réminiscences d'un thé malheureusement déjà bu. Non seulement l'espéranto m'a-t-il permis d'emprunter les chemins écartés, fort loin du tourisme-économico-capitaliste, mais en plus j'ai pu tranquillement goûter aux plaisirs culinaires moscovites en très bonne compagnie. Et là en est le plus majestueux intérêt.

L'intérêt de connaître l'âme russe! L'intérêt, que dis-je la passion de le faire dans une langue neutre, sans déjà-vu, sans prétention, dans un respect mutuel auparavant inconnu. L'intérêt de faire d'une rencontre estivale une histoire qui se continuera sûrement à Sarajevo en 2006...

Auparavant ou par la suite, Vienne, Munich, Nuremberg, Oslo et St-Petersbourg ne ressemblent plus qu'à de simples haltes d'un long séjour, mais deviennent individuellement des expériences d'une richesse géniale, d'une richesse espérantiste.

Oui, ça marche!

* Le prochain IJK se tiendra à Sarajevo.

Sudoku

Martin Benoit

Sudoku (Sudoku en la japana) estas puzzle kiu estas solvebla plenigante la krandon per ciferoj. Oni devas meti ĉiujn ciferojn inter 1 kaj 9 nur unufoje en ĉiu kolumno, ĉiu linio kaj ĉiu 3 x 3 regionoj. Por ĉiu sudoka krado estas jam enmetitaj indicoj, kaj estas nur unu solvo. La solvado de sudoku nur postulas logikon kaj paciencon.

La puzzle komencis esti disvastigata en japanaj ĵurnaloj en 1986, kaj atingis internacian intereson nur antaŭ kelkaj monatoj. La sudoka furoro frapis unue Brition en januaro kaj tre rapide disvastiĝis en pluraj aliaj gazetojn en Britio kaj en pluraj aliaj landoj. Eĉ en Kebekio, la ĵurnalo *Le Devoir* komencis publikigi sudokojn ekde julio, kaj la metrosistema ĵurnalo *Metro* faris same ekde komenco de septembro.

La subitan popularecon de sudokoj oni povas ekspliki per ĝia simpleco kaj ĝia komplekseco samtempe. Malkiel krucvortoj kiuj postulas ĝeneraran sciaron, sudoku nur demandas logikon. La reguloj estas tre simplaj, sed trovi la solvon povas esti tre malfacile.

Jen ekzemplo de Sudoku. En la griza kvadrato, oni povas dedukti ke en ĝi estas la cifero 1. Kial? Ĉar en la nordorienta regiono, oni nur povas meti la ciferon 1 en tiu-ĉi kvadrato. La dua kaj tria linio jam enhavas 1, kaj la naŭa kolumno enhavas 1 ankaŭ. Tio forigas la eblecojn meti la ciferon aliloke en la nordorienta

regiono krom la griza kvadrato. Simple, ĉu ne? Estas aliaj logikaj trukoj kiujn oni povas elpensi por trovi ciferojn. Por scii pli, vi povas viziti la oficialan retejon www.sudoku.com (en la angla),

kaj vi eĉ povas provi solvi ĉi-tiun sudokon, kies nivelo estas facila.

Marteno Benoit

		7					5	
1	2				3		4	
			1	7				3
	1		7		2	5		
		6				7		
		2	6		9		8	
5				8	4			
	8		5				2	1
	3					8		



Go-Ludo dum maja renkontiĝo ĉe Commensal...

Kapitano Postnikov : de doktoro Ĵivago al Montrealo

François Lorrain

Dek tagoj de kapitano Postnikov estas nova romano — aperinta en 2004 — de la ruso Mikaelo Bronŝtejn, konata Esperantista kanzonisto kaj verkisto. Ĝi estas historia romano pri iu kapitano Postnikov, aktivega rusa Esperantisto de Sankt-Peterburgo de ĉirkaŭ 1910, kiu vere ekzistis. Ĝi havas kelkajn komunajn trajtojn kun la famega romano Doktoro Ĵivago de la rusa verkisto Boriso Pasternak. Krome ĝi entenas interesan informon pri la tiutempa montreala Esperanto-movado.

La verko priskribas la vivon de Postnikov dum la jaroj 1909–1911 pli-malpli. Li estis idealista rusa oficiro, kiu multon faris por la Esperanto-movado en Rusujo. Li fondis la mallongadaŭran Universalan Ligon, kies celo estis

« unuigi pensotalenton de inteligentaj homoj [...] por analizi la kaŭzojn kaj ellabori saĝajn proponojn pri rimedoj por evito de militoj » (p. 207).

Bedaŭrinde estiĝis granda malamikeco inter Postnikov kaj iuj Esperantistoj, aparte moskvaj aktivuloj. Tio estis parte pro ĵaluzo, sed devis esti ankaŭ aliaj kaŭzoj. La moskvanoj akuzis lin pri diktatoreco; tamen malmulto en la libro pravigas tiun akuzon. La intrigo de la romano, kiel ofte la vivo mem, estas kompleksa. Ĝi prezentas la paralelajn vivfadenojn de kelkaj personoj.

Unu el tiuj vivfadenoj konsistas el konversacioj, kiuj okazas dum dek tagoj inter Postnikov kaj Zamenhof sur la ŝipo, per kiu ili kunvojaĝas al la Universala Kongreso de Vaŝingtono en 1910. La konversaciojn imagis la aŭtoro, sed la menciita kunvojaĝado ja okazis. Fotoj kaj aliaj dokumentoj, interalie pluraj interesaj elĉerpaĵoj el la tiutempa rusa gazetararo (en originala rusa versio kaj Esperanta traduko), kreas realecan atmosferon. La plej gravaj roluloj estas plejmulte nefikciaj kaj la aŭtoro kreis nur kelkajn neaŭtentikajn dokumentojn, kiujn li listigas en la postparolo de la libro.

Dum jaroj la rusaj Esperantistoj pli-malpli forgesis Postnikovon. Sed kelkaj el ili poste sukcesis trovi plurajn dokumentojn pri li, kaj la romano estas provo, laŭ mi sukcesa, rehonorigi lin. La romanon mem sekvas nepre legenda okpaĝa biografio de Postnikov, redaktita de Anatolo Sidorov, kiu priskribas interalie la tragikegan, sed admirindegan, vivon de Postnikov post la okazaĵoj de la romano.

Ties etoso — neĝo, malvarmo, amo, danĝero, fuĝo, tragedio — foje similas al tiu de Doktoro Ĵivago de Pasternak, verko kiu ege impresis min, kiam mi legis ĝin antaŭ pluregaj jaroj. Dek tagoj tamen ne estas tiom impresa, nek tiom poezia, korŝira. Ĝi ja ne estas tiom granda verko. Tamen la aŭtoro subtenas la intereson de la leganto per iom da suspenso kaj per enhavo varia. Li rajtas fieri pri la rezulto de la grandega

laboro, kiun tiu verko certe postulis.

Jen kelkaj aliaj interesaj aspektoj de la romano.

(a) Ĝi substrekas la gravecon de virinoj en la movado.

(b) La aŭtoro uzas kelkajn elementojn de la tiama Esperanta lingvaĵo: ekz. “tialo” (kialo), “aldonita” (sindona).

(c) Oni ankaŭ lernas interesaĵon pri la unuaj montrealaj Esperantistoj: je paĝo 58 la aŭtoro citas el la montreala Esperantista gazeto *La lumo* (numero 11, novembro 1902):

« [...] la klubo montreala sendis al d-ro Zamenhof fonografon, kun la peto, ke li elparolu diversajn tekstojn antaŭ la aparato. La celo estas ricevi estontan modelon de tute perfekta Esperanta elparolado [...] La redakcio sciigas, ke fonografaj cilindroj, senditaj al la Majstro, kaj la cilindroj, ricevitaj returnen, pruvis, ke l'elparolado de d-ro Zamenhof kaj tiu de l'kanadanoj estas tute egalaj. »

Tiu gazeto estis fondita de la pionira kanada Esperantisto A. P. Beauchemin en 1901.

Malgraŭ siaj multaj kvalitoj, tamen, la libro havas kelkajn difektojn.

Unu estas, ke, dum iliaj konversacioj, Postnikov kaj Zamenhof ĉiam fumas kaj fumas, kaj la aŭtoro iom tede

Kapitano Postnikov ... (sekvo)

substrekadas tion.

Li ankaŭ multe uzas la rusajn antaŭnomojn kaj patronomojn de la roluloj, dirante ekzemple « Aleksandr Aleksejeviĉ » anstataŭ « Postnikov ». Kompreneble, tio estas tute normala rusa kutimo. Por nerusa leganto tio certe aldonas pli da rusa etoso. Sed la sama leganto ofte konfuziĝas kaj demandas al si: pri kiu nun temas?.. Iam dum mia legado, tiu malfacilaĵo tiom tiklis min, ke mi komencis noti sur apartan folion la tutan nomon de ĉiu rolulo. Sed mi baldaŭ forlasis tiun sekan taskon kaj, kun senzorga plezuro, simple legis la romanon!

Je la materia flanko: malbonega bindaĵo (la paĝoj disfalas), multaj tajperaroj (sed ni jam kutimas je tio en Esperantujo), malbela tipografio kaj enpaĝigo.

Konklude: jen originala kaj interesa romano, ja leginda.

De quoi rire ou pleurer?

Auteur inconnu

La Commission européenne a finalement tranché: après la monnaie unique, l'Union européenne va se doter d'une langue unique, à savoir... le français.

Trois langues étaient en compétition:

- le français (parlé par le plus grand nombre de pays de l'Union)
- l'allemand (parlé par le plus grand nombre d'habitants de l'Union)
- et l'anglais (langue internationale par excellence).

L'anglais a vite été éliminé, pour deux raisons:

1. L'anglais aurait été le cheval de Troie économique des États-Unis;
2. Les Britanniques ont vu leur influence limitée au profit du couple franco-allemand en raison de leur légendaire réticence à s'impliquer dans la construction européenne.

Le choix a fait l'objet d'un compromis, les Allemands ayant obtenu que l'orthographe du français, particulièrement délicate à maîtriser, soit réformée, dans le cadre d'un plan de cinq ans, afin d'aboutir à l'eurofrançais.

1. La première année, tous les accents seront supprimés et les sons actuellement distribués entre « s », « z », « c », « k » et « q » seront repartis entre « z » et « k », ce qui permettra de supprimer beaucoup de la confusion actuelle.

2. La deuxième année, on remplacera le « ph » par « f », ce qui aura pour effet de raccourcir un mot comme « photographe » de quelque vingt pourcent.

3. La troisième année, des modifications plus drastiques seront possibles, notamment ne plus redoubler les lettres qui l'étaient: tous ont aussi admis le principe de la suppression des « e » muets, pour éternel de confusion, en effet, tous ceux qui ont un « e » muet.

4. La quatrième année, les gens seront devenus réceptifs à des changements majeurs, tel que remplacer « g » par « ch », par « j », par « k », selon les cas, ce qui simplifiera d'avantage l'écriture de tous.

5. Durant la cinquième année, le « b » sera remplacé par le « p » et le « v » sera lui aussi abandonné, au profit du « f ». Évidemment, on gagnera ainsi plusieurs touches sur le clavier. Un fois le plan de suppression achevé, l'orthographe sera définitivement simplifiée, et les gens pourront se comprendre et communiquer. Le référendum de l'Union culturelle de l'Europe sera définitivement réel!

Montrealaj Esperanto-kunvenoj (MEK)

DATO	KIE	HORO	TEMO
sab. 8-9-10 okt. 2005	NovJorkio, Usono		12 ^a Aŭtuna Renkontiĝo (ARE)
mar. 11 ^a okt. 2005	Commensal *	19 h	Babil'vespero
ven. 28 ^a okt. 2005	MEDO **	20 h	Artoj, ĉu necesas por la vivo?
sab. 12 ^a nov. 2005	MEDO **	19 h 30	Filma vespero
lun. 14 ^a nov. 2005	Commensal *	19 h	Babil'vespero
ven. 25 ^a nov. 2005	MEDO **	20 h	Vojaĝoj, venu rakonti pri bela vojaĝo.
lun. 12 ^a dec. 2005	Babil'vespero	19 h	Babil'vespero
sab. 17 ^a dec. 2005	Botanika Ĝardeno †	18 h	Decembra festo kaj komuna bufedo
lun. 9 ^a jan. 2006	Commensal *	19h	Babil'vespero
ven. 27 ^a jan. 2006	MEDO **	20 h	Lingvoj, kio bonas kaj malbonas en la konataj lingvoj de vi?
lun. 13 ^a feb. 2006	Commensal	19 h	Babil'vespero
ven. 24 ^a feb. 2006	MEDO **	20 h	Sportoj, ĉu vi estas sportema ?

* **Commensal** : 1720, rue Saint-Denis, 845-2627, métro Berri-UQAM

18h *Libervola alveno por manĝo.*

Souper libre

19h *Amika babilado sen fiksita temo.*

Discussion amicale sans thématique

** **Montreala Esperanto-Domo (MEDO)**: 6358-A rue de Bordeaux, Montréal

Entre Papineau et De Lorimier.

Métro Beaubien, Autobus 18 Beaubien Est

Voir le site web pour un plan d'accès : www.esperanto.qc.ca

19 h *Horo por komencantoj, lernado, konversacio, demandoj pri la movado.*

Heure pour les débutants : conversation, questions, grammaire...

20 h *Anoncoj, libera babilado, libro - pruntado kaj - aĉetado, aliĝo al ESK.*

Annonces, emprunt ou achat de livres, de revues, adhésion à la SQE.

20 h 30 *Tema programo, diskuto, kvizo, ludo...*

Programme thématique, discussion, quizz, jeux...

† **Botanika Ĝardeno (Jardin Botanique)** : 4101, rue Sherbrooke Est, Montréal

Métro Pie-IX, stationnement gratuit

ENTREZ PAR LES SERRES, derrière le bâtiment administratif.

Por komentoj, proponoj, demandoj : informo@esperanto.qc.ca